★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## June kaj Kune

June kaj Kune estas muzikalo, originale verkita en Esperanto en la jaroj 2021 kaj 2022, kiu premieris kadre de la 78-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, la 26-an de aŭgusto 2022. Pro tio ĝi estas la unua originala muzikalo en Esperanto. La titolo de la muzikalo referencas la sloganon de TEJO: June kaj kune.
La muzikalo rakontas historion de kelkaj partoprenantoj de fikcia Internacia Junulara Kongreso: Iuj trovas amon, iuj trovas hejmon, kaj iuj trovas neatenditan helpon. 34 junuloj, loĝantaj en 14 landoj kaj 5 mondopartoj, kuniĝis en tiu ĉi unika projekto. La spektaklo estis prezentita la 26-an de aŭgusto 2022, ekde la 20:00, dum IJK 2022 en Westelbeers, Nederlando.
Ni kune spektos registraĵon de la muzikalo.
**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 22an de majo 2024 je la 18-a h (ĝis la 20a, La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis jarfino.
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 La 73. konkreso de Kristana esperantista ligo internacia, Vác, Hungario73.
- Literatura Konkurso Esperanto ligas homojn**.** Limdato 31-an de JULIO
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno!

★

## Cetera programo en majo

La 29-an **Omaĝe al Věra Podhradská** – Miroslav Malovec, rete per Skajpo

## Programo en junio

La 5-an **Problemoj de internacia komunikado** – Filip Křepelka (ĉeĥe), Klubejo Hybešova 65a, Brno
la 12-an **Orĥideoj** – Oldřich Arnošt Fischer, komuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom
la 19-an **Kolik jazyků znáš, tolikrát jsi člověkem** – Josef Vojáček, Knihovna Jiřího Mahena, je la 16a h.
La 26-an **Komuna rostumado**, parko Lužánky, Brno (je la 17a h)
Julie kaj aŭguste renkontiĝoj ne okazos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)